

Post la okazintaj elektoj de la Direktoroj de la Sekcioj de la Akademio de Esperanto la estraro nun konsistas el la sekvantaj personoj: prezidanto: i-ro J. R. G. Isbrücker, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando; vic-prezidantoj: A. Cseh, Riouwstr. 172, Den Haag, Nederlando; prof. E. Privat, Evole 3, Neuchâtel, Svisujo. La taskojn de la ĝenerala sekretariokasisto provizore plenumas la prezidanto kun helpo de la Internacia Esperanto-Instituto. Direktoroj de la diversaj sekcioj: Gramatiko: d-ro W. Lippmann, 1021 East 14th Str., Brooklyn 33, N.Y., Usono. — Literatura: G. Avril, 60 Bd. Auguste Raynaud, Nice (A.M.), Francujo. — Ĝenerala Vortaro: prof. G. Waringhien, 7 Av. Léon Gourdault, Choisy-le-Roy, Francujo. — Teknikaj Vortaroj: J. Okamoto, 2435 Sinobli-cho, Ueno-si, Mie-ken, Japanujo. — Bibliografio: d-ro P. Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhavn-K, Danujo.

051.22 (ISAE).053.7.1951" (43-2.6)

### RAPORTO PRI LA ISAE-FAKKUNVENO DUM LA UNIVERSALA KONGRESO 1951 EN MUNKENO.

La fakkunveno de ISAE okazis en la universitato kaj ĉeestis 30 personoj. La tajordo estis jena:

1. Malfermo.
2. Jarraporto de la ISAE-delegito por Germanujo.
3. Referato de dipl. inĝ. R. Haferkorn pri: RADIO-TERMINARO.
4. Referato de dipl. inĝ. Kurt Dellian pri: LA PLENA SCIENCO-TEKNIKA VORTARO kaj VORTARAJ PRINCIPOJ.
5. Diskuto pri terminologia laboro.
6. Parolado de d-ro J. Weber pri: LA LIBERECO DE LA HOMA VOLO.
7. Laŭtleĝo de la letero de s-ano W. P. Roelofs, ekonomia raporto kaj revizora raporto.
8. Aliaj demandoj.

S-ano Haferkorn montris dum la raporto pri Radio Terminaro la elverkitan manuskripton, kiu entenis proks. 800 terminoj.

Poste s-ano Dellian skizis la vortarajn principojn kaj proponis metodojn por realigi la verkadon de la PLENA SCIENCO-TEKNIKA VORTARO, kiu ĝis nun bedaŭrinde mankas. Tiu vortaro estu unue skeleto, kvazaŭ ekstrakto de teknika kaj scienca terminologioj al kiu de tempo al tempo aliĝu mankantaj terminoj. La vortara modelo estas la Plena Vortaro de SAT (esperanto-esperanta). La nova terminaro ne enhavu tiujn terminojn jam indikitajn en PV. 5000—8000 novaj terminoj certe sufiĉus por la unua eldono.

Dum trijara laboro pri tiu PSTV la iniciatoro spertis, ke la kunlaboro estas treege modesta kaj nur unu persono, dipl. inĝ. R. Haferkorn fakte ellaboris parton de la UIDK. De aliaj personoj nur venis kritikoj, instigoj, konsiloj sed nenia praktika helpo. Certe la ellaboro de tiu terminaro restas en la manoj de kelkaj viglaj personoj.

Kompreneble dediĉi ankoraŭ la eksterprofesian tempon al tiu plano estas granda sinoferemo. Sed tamen ni estas sur bona vojo finverki tiun terminaron.

La diskuto estis tre interesa.

Dipl. inĝ. Kurt Dellian  
ISA-ĉefdelegito por Germanio.

413.164 : 621.396 (054)

### PRI TERMINOLOGIA LABORO

Raporto de dipl. inĝ. R. Haferkorn, farita ĉe la kunsido de ISAE de la 36-a Universala Kongreso de Esperanto en München la 6an de Aŭgusto 1951.

Esperanto de tago al tago pli evidente pravas, ke ĝi ne nur estas la dua konversacia lingvo por ĉiu, sed ke ĝi estas ankaŭ kapabla levi la lingvon de la fakuloj sur sian neŭtralan fundamenton. Kiel en la pasinteco la latina lingvo estis la mondlingvo de la scienculoj, en la estonteco la mondlingvo de la scienculoj kaj teknikistoj estos sendube Esperanto. Multnombraj fakvortaroj jam estas eldonitaj en nia lingvo internacia, kaj ĉiam denove sekvas aliaj fakoj, kvankam ĝisdate ne laŭ certa plano.

Mi mem okupiĝas jam longtempe pri la traduko de fakaj artikoloj kaj pri la verkado de tiel nomataj „Esprimaroj”, t.e. tekstoj por scienco-teknikaj revuoj, ekz. por „La Interligilo”, la revuo por telekomunikado. Tiaj esprimaroj devas montri al la legataro la uzadon de la fakterminoj, por la celo evoluigi iom post iom plenan terminaron de la koncerna fako. El la praktiko de la tradukado kaj artikolverkado rezultas multego da bezonataj terminoj, kiuj parte povas esti fiksataj nur provizore.

Tie komenciĝas nia terminologia laboro, kiu tamen ne povas esti lasata al la arbitro de la unuopuloj, sed devus esti regata de iu centro aŭ komitato por certe atingi la celon — la Plenan Scienco-Teknikan Terminaron. En la esprimoj „Vortaro” kaj „Terminaro” ja troviĝas sendube miskomprenblo. Tial mi unue devas distingi ke ekzistas *du specoj* de vortaroj aŭ terminaroj:

1. La unua speco enhavas nur la vortojn formitajn nepere el la radikoj kaj la plej simplajn vortkunmetaĵojn konsistantajn el du radikoj kiuj kune formas tute memstaran nocion, ekz. Elektromagneto, Filharmonio, Gumiguto, kiel ili troviĝas en la Plena Vortaro de SAT. Tiun principon nia tre estimata Prof-o Waringhien certe konservas finverkante sian ampleksan enciklopedion — la „Plenan Vortaron Ilustritan”.